



Praha 28. 3. 1950 · Roč. V · Číslo 3

ESPERANTISTA

REVUO POR ESPERANTO EN ĈEĤOSLOVAKIO

Eldonas Esperanto-Asocio en ĈSR, Praha II, Malá Štěpánská 7. — Redaktas Dr Stan. Kamarýt.

ESPERANTO-ASOCIO EN ĈEĤOSLOVAKA RESPUBLIKO KAJ SLOVAKA ESPERANTO-SOCIETO

invitas ĉiujn esperantistojn kaj amikojn de Esperanto al

VIII-a ĈEĤOSLOVAKA KONGRESO ESPERANTISTA

okazonta kun honora patroneco de la Centra Nacia Komitato

EN BRNO LA 27—29 MAJO 1950

- Sabato:** Depost la 10-a horo akceptado de gastoj en la stacidomo.
Je la 20-a horo: Interkonatiĝa vespero (amika kunveno, amuza programo, danco)
- Dimanĉo:** Je la 10-a horo: Solena inaŭguro de la kongreso.
Je la 12-a horo: Komuna tagmanĝo.
Je la 14-a horo: Regula jarkongreso de EAĈSR kun laŭstatuta programo kaj krome:
Reguligo de rilato inter EAĈSR kaj SES.
Je la 14-a horo: Regula jarkunveno de SES kun laŭstatuta programo kaj krome:
Reguligo de rilato inter SES kaj EAĈSR.
Je la 20-a horo: Solena artvespero kaj koncerto.
- Lundo:** Je la 8—11-a horo: Fakaj kunvenoj.
Je la 11-a horo: Ferma kunveno de la kongreso. Rezolucioj.
- La kongresaj kunvenoj kaj la interkonatiĝa vespero okazos en Společenský dům Zbrojovky,
Marxova 8.
- La artvespero okazos en Stadion, Leninova str.
- Dimanĉon matene okazos diservoj kun predikoj kaj liturgioj en Esperanto.
- Lundon okazos ekskursoj al Moravia Karsto kaj al la lago apud Knínice. Ŝipekskursoj.
- Kongreskotizo Kĉs 50.—, pagebla per poŝta pagilo al n-ro M 101.403, Klub esperantistů, Brno.
- Por la artvespero oni postulos enirpagon.
- En ĉi tiu n-ro enestas aliĝilo, bonvolu ĝin sendi al la Loka Kongresa Komitato en Brno, laŭ
adreso: Josef Friedrich, Brno, Hobilíkova 8.
- La lasta dato por mendo de loĝejo estas la 10. V. 1950.
- Bonvolu helpi al la sukceso per frua sendo de plenigita aliĝilo.
- Ne ekzistu samideano, samideanino, kiu almenaŭ ne aliĝus, eĉ se li aŭ ŝi ne povas persone ĉeesti.

Josef Krumpholtz zemřel

Citují z úmrtního oznámení:

»V ranních hodinách dne 3. března 1950 dotrpěl duševně i tělesně... Josef K r u m p h o l t z, bývalý ředitel Blahoslavovy školy a správce Komenského musea v Přerově, úspěšný pedagog, kulturní pracovník a spisovatel, nadšený komeniolog a pilný spolupracovník vědeckých společností, čestný občan svého posledního bydliště — města Holešova, vpravdě čestný a vzorný člen moravského učitelstva, jemuž po léta stál v čele, vpravdě křesťan a čestný člen lidské společnosti«... a já dodávám: na důležitý úsek jeho téměř osmdesátiletého života nesmí být zapomenuto. Je to otázka pomocného jazyka mezinárodního.

Nadšený komeniolog nevyhnul se této ideji Komenského a zapojil se prakticky do hnutí esperantského. Českoslovenští esperantisté děkují mu za pilnou a vzácnou spolupráci při prvních důkladných učenících esperanta pro Čechy. Byl také redaktorem prvního českého časopisu »Český esperantista« a spolupracovníkem učitelského časopisu »Internacia Pedagogia Revuo«, v němž seznamoval cizí svět s naším Komenským. A nebyl by to pravý učedník Komenského, kdyby také prakticky nevyzkoušel sám na sobě, jak se esperanto osvědčuje při skutečném užívání ve styku s cizinci. Proto cestoval v cizině a užíval v hovoru s cizími esperantisty výhradně esperanta. Navštívil se svými spolupracovníky Čejkou, Grňou a Holubem Itálii, Švýcarsko, Francii, Belgie, Holandsko, Německo a nakonec zajel sám na pozvání dánských kolegů esperantistů do Dánska a pobyl v jejich vlasti plných šest neděl pořádaje přednášky pro žactvo t. zv. hejskol i pro širší obecnost. Tedy zas první propagátor české vlasti pomocí esperanta.

Zúčastnil se také universálních esperantských kongresů v Ženevě a v Cambridgi.

Tak žil a pracoval věrný učedník a následovatel Komenského, Palackého a Masaryka.

Th. R. Čejka.

Testamento de Julius Fučík

Sub tiu titolo estas prespreta la esperanta traduko de la fama libro de Julius Fučík: Reportaĵo psaná na oprátce (laŭvorta traduko: Reportaĵo skribita en pendumila maŝo). La libro aperis jam en multaj lingvoj. Parton el ĝi publikigis Literatura Mondo en 1947 (n-ro 9—10), versaĵne laŭ hungara traduko, videble tre nepreciza. La libro enhavas notojn, kies skribon kaj elporton el la malliberejo de la gestapo en Praha ebligis ĉeĥa gardisto. Ĝi estas unu el la plej homaj dokumentoj de sufero, de kuraĝo kaj sindono al la afero. — La tuta esperanta traduko aperos tuj post ricevo de permeso kaj papero.

Malliberulo kaj soleco — la du ideoj ordinaraj kunfandiĝas. Kaj tio estas granda eraro. La malliberulo ne estas sola, la malliberejo estas granda kolektivo kaj eĉ la plej rigora izoligo neniun povas elŝiri el ĝi, se li mem ne eligas sin. La frateco de subpremataj suferas tie grandan premon, kiu ĝin koncentras, hardas kaj faras pli sentema. Ĝi penetras tra la muroj, kiuj vivas, parolas aŭ frapas signojn. Ĝi ĉirkaŭbrakas la ĉelojn de unu sama koridoro, kiuj estas kunigitaj per komuna suferado, komuna servado, komunaj koridoristoj kaj komunaj duonhoroj en libera aero, kiam unu sola vorto aŭ gesto sufiĉas, por ke informo estu donita aŭ homa vivo savita. Ĝi kunigas la tutan malliberejon per komunaj veturoj al la enketado, per komuna sidado en la atendejo nomata „kinejo“ kaj per komunaj revenoj. Ĝi estas frataro de nemultaj vortoj kaj de grandaj servoj, ĉar eĉ nura manpremo aŭ subŝovita cigaredo disbatas la kaĝon, en kiun oni vin metis, kaj ĝi liberigas vin el la izoleco, kies celo estas vin rompi. La ĉeloj havas manojn; vi sentas, kiel ili subtenas vin por ke vi ne falu, kiam vi revenas torturlaca de la pridemandado; el ili vi akceptas nutraĵon, se la aliaj vin pelas al malsatmorto. La ĉeloj havas okulojn; ili vin rigardas, kiam vi foriras por esti ekzekutita, kaj vi scias, ke vi devas iri rekta, ĉar vi estas ilia frato kaj vi ne rajtas ilin malplifortigi, eĉ ne per hezitanta paŝo. Ĝi estas frataro sanganta, sed nevenkebla. Se ĝia helpo ne ekzistus, vi ne kapablus porti eĉ dekonon de via sorto. Nek vi nek iu alia.

En tiu ĉi rakontado, se mi povos ĝin daŭrigi (ĉar: oni ne scias la tagon nek la horon), ofte aperos la cifero „Kvarcento“. Mi ekkonis ĝin kiel ĉambron, kaj la unuaj horoj en ĝi kaj la unua rezonado en ĝi estis neĝojigaj. Sed ĝi ne estis ĉambro — ĝi estis kolektivo. Kaj ĝi estis kolektivo ĝoja kaj batala.

La Kvarcento estis kreita en 1940, kiam la agado de la kontraŭkomunista sekcio. Ĝi estis filio de la hejma malliberejo, de la „kinejo“ — filio de la atendejo por la enketatoj, destinita por la komunistoj, por ke oni ne bezonu ilin konduki por ĉiu demando el la teretaĝo en la kvaran etaĝon, por ke ili estu ĉiam ĉe mane de la enketantaj oficistoj de la gestapo. Ĝi estis faciligo de ilia laboro. Tia estis ilia ideo pri ĝi.

Sed metu du kaptitojn — kaj eĉ pli, du komunistojn — kune kaj post kvin minutoj ekzistas tie jam kolektivo, kiu konfuzos ĉiujn viajn planojn. En la jaro 1942 ĝi ne plu estis nomata alie ol: „Komunista centralo“. Ĝi travivis multajn ŝanĝojn, kaj miloj kaj miloj da kamaradoj, viroj kaj virinoj, sinsekve sidis sur ĝiaj benkoj. Sed unu afero en ĝi ne ŝanĝiĝis: la animo de kolektivo, sindona al la batalo kaj kredanta je la venko.

La Kvarcento, tio estis tre antaŭen metita tranĉejo, ĉirkaŭita jam ĉiufanke de la malamiko kaj surŝutata per koncentrita paŝado, sed per neniun spiro pensanta pri kapitulaco. Ruĝa standardo flirtis super ĝi. Sed manifestiĝis ĉi tie la solidareco de la tuta nacio batalanta por sia liberigo.

Malsupre, en la „kinejo“, marŝis tien kaj reen la SS-gardistoj en altaj botoj kaj kun krio akompanis ĉiun palpebrumon de via okulo. Tie ĉi, en la Kvarcento, deĵoris ĉeĥaj inspektoroj kaj agentoj el la polica direkto, venintaj en la servon de la gestapo kiel tradukistoj, aŭ memvole aŭ per ordono de siaj superuloj, kaj farantaj sian devon aŭ kiel servantoj de la gestapo aŭ — kiel ĉeĥoj. Aŭ kiel io intere. Tie ĉi ne plu estis necese sidi streĉite kun la manoj sur la genuoj kaj kun la okuloj fiksitaj antaŭ sin, tie ĉi vi jam povis sidi pli libere, vi povis turni la kapon, vi povis manĝesti — kaj vi povis eĉ pli, laŭ tio, kiu el la tri specoj en tiu momento deĵoris.

La Kvarcento estis loko de la plej profunda konatiĝo kun la animalo nomata la homo. La proksimeco de la morto senvestigis ĉi tie ĉiun ĝisnude. Kaj tiujn, kiuj

sur la maldekstra brako portas ruĝan rubandon de la enketatoj-komunistoj aŭ suspektatoj pro kunlaboro kun la komunistoj, kaj tiujn kiuj devis ilin ĉi tie gardi, aŭ kiuj en iu proksima ĉambro partoprenis la enketadon de ili. Tie, dum la enketado, vortoj povis esti ŝildo aŭ armilo. Tamen en la Kvarcento vi ne plu povis vin kaŝi malantaŭ vorto. Tie ĉi oni ne pesis, kion vi diras, sed kio estas en vi. Kaj en vi restis nur tio ĉefa. Ĉio flanka, kio moderigadis, malfortigadis aŭ plibeligadis la fundamentojn de via karaktero, forfalas, estis forŝirita de antaŭmorta ventego. Restis sole subjekto kaj predikato: fidelulo rezistas, perfidulo perfidas, burĝeto malesperas, heroo batalas. En ĉiu homo troviĝas forto kaj malforto, kuraĝo kaj timo, firmeco kaj ŝanceliĝo, pureco kaj malpureco. Sed ĉi tie rajtas esti sole la unu aŭ la alia. Aŭ — aŭ. Kaj se iu provis kaŝe ekvilibri intere, li estis pli okultrapa ol tiu, kiu — flavan plumon surĉape kaj cimbalon enmane — dancus en funebra procesio.

Estis tiaj inter la kaptitoj, estis tiaj ankaŭ inter la ĉefaj inspektoroj kaj agentoj. Dum la enketado, ili bruligis kandelon al sia Regna disinjoro, kaj en la Kvarcento ili bruligis alian al la bolŝevika diablo. Antaŭ germana komisaro ili elbatis viajn dentojn por elbati el vi la nomon de via ligo-viro, kaj en la Kvarcento ili amike proponis al vi panon, por ke vi forpelu la malsaton. Dum dom-traserĉo ili priŝtelis vian tutan loĝejon kaj en la Kvarcento ili subŝovis al vi el la rabaĵo duonon de cigaredo por montri kiel ili kunsentas kun vi.

Aliaj — ili estis nur iom alia vario de la sama speco — neniam agis kontraŭ vi proprainiciate, sed des malpli ili helpis. Ili pensis ĉiam nur pri sia haŭto. Ĝia sentemo ŝanĝis ilin je bonega politika barometro. Ili estas rigoroj kaj tre oficialaj? Estu certa: la germanoj antaŭenmarŝas kontraŭ Stalingrad. Ili estas afablaj kaj iam ekparolas kun la kaptitoj? La situacio estas favora: evidente la germanoj estis ĉe Stalingrad reĵetitaj. Ili komencas rakonti pri sia malnova ĉeĥa familio kaj pri tio, ke ili servas en la gestapo laŭ supera komando? Bonege: la Ruĝa armeo certe jam avancis trans Restov. — Kaj ankoraŭ aliaj de la sama speco enpovigas la ~~serojn~~ ~~liam~~ vi ~~dronas~~, kaj ~~valente~~ etendas la manon al vi, kiam vi mem jam elrampis sur la bordon.

La homoj de tiu ĉi speco sentis la ekziston de la kolektivo en la Kvarcento kaj klopodis proksimiĝi al ĝi, ĉar ili sciis taksu ties forton, tamen ili neniam apartenis al ĝi. Kaj estis alia speco, kiuj pri la kolektivo eĉ ideon ne havis: mi dirus murdistoj, sed murdisto estas de la homa gento. Ĉefe parolantaj bestioj kun bastono kaj fero en mano, torturantaj la ĉefajn kaptitojn tiel, ke multaj el la germanaj komisaroj forkuradis de tiu spektaklo. Ili eĉ ne povis hipokrite motivi tion per intereso de sia nacio aŭ de la Regno, ili torturis kaj murdis por sia ĝuego, ili elbatadis dentojn kaj oreltamburojn, elpremadis okulojn, piedfrapadis seksorganojn, nudigadis la cerbon de la torturataj viktimoj kaj mortbatadis ilin pro krueleco, kiu havis motivaĵon nur en si mem. Ĉiutage vi ilin vidis, ĉiutage vi devis rilati kun ili, toleri ilian apudeston, kiu plenigis la tutan aeron per sango kaj krio; vin helpadis sole la firma kredo, ke ili ne povas fuĝi antaŭ la justeco, eĉ se ili elmurdus ĉiujn atestantojn de siaj krimoj.

Kaj apud ili ĉe la sama tablo, en rango ŝajne egala, sidis homoj, kiujn estus juste skribi kun granda H. La homoj, kiuj el la mallibereja aranĝo kreis aranĝon malliberulan, homoj helpantaj krei la kolektivon de la Kvarcento kaj ankaŭ al ĝi apartenantaj kun sia tuta koro kaj kun sia tuta kuraĝo. Ilia grandeco elstaras des pli, ke ili ne estis komunistoj, male ili antaŭe, en la servo de la ĉeĥa polico, laboris kontraŭ la komunistoj, sed ekkonis la forton kaj ekkomprenis la signifon de la komunistoj por sia tuta nacio, vidante ilin en batalo kontraŭ la okupantoj, kaj de tiu momento ili fidele servis kaj helpis al ĉiu, kiu restis fidela ankaŭ sur la benko malliberula.

Multaj el la batalantoj ekstere ekhezitus, se ili havus ideeton pri la teruro ilin ĉi tie atendanta, se ili venos en la manojn de la gestapo. Tiu ĉi havis tiujn terurojn konstante antaŭ la okuloj, ĉiun tagon, ĉiun horon. Ĉiutage kaj ĉiuhore ili povis atendi, ke oni ilin sidigos apud la ceteraj malliberuloj kaj ke ili suferos eĉ pli terure. Kaj tamen ili ne hezitis. Ili helpis savi la vivon de miloj kaj faciligis la sorton al tiuj, kies vivon savi ili ne plu povis. Apartenas al ili la titolo de herooj. Sen ilia helpo la Kvarcento neniam estus povinta esti tio, kio ĝi fariĝis kaj kia ĝin ekkonis miloj da komunistoj: hela loko en malhela domo, tranĉeo en la dorso de la malamiko, centro de la libereca batalo rekte en la nesto de la okupantoj.

Trad. Rud. Hromada

Dr Tomáš Pumpr: Několik národních písní v esperantské úpravě

Lulkanto

(Letěla bělounká holubička...)

Blanka kolombo forflugas de l' ter'.

„Kien vi celas?“ ĝin petas anĝel'.

„Mi, animo de patrino,

volus forflugi ĝis alta ĉiel'.“

„Flugu sen timo plu, flugu sen tim'.

kaj ĉe la ido alternos mi vin.

Mi lin vartos, li bontartos,

kvazaŭ lin kisus mem lia patrin'.“

Dobru noc...

Jam dormu, jam dormu, karulin'.

Di-graco en paco gardu vin.

Sonĝu do, ho trezor'.

pri bona sindona mia kor'!

Pásla ovečky

Ŝafojn paŝtis ŝi
meze de l' verda val'.

Ŝafojn paŝtis ŝi
en la arbar'.

Vokis ŝi: „Ŝato, ho ŝafet'!“

Sekvis ĝi: paŝo post paŝet'...

Ŝafoj, migru al
nordo de stal'!

Soldat-ludo

(Tluĉe bubeníček...)

Batas la tamburo,
marŝus kompani'...

En rapida kuro

kunvenadas ni.

Lignaj sabroj kaj fusiloj

estos niaj bataliloj.

Hola, hola hej!

Ek al batalet'!

Lásko, bože, lásko!

Amo, juna amo,

kie ni vin prenas?

Montoj vin ne naskas,

homoj vin ne semas.

Amo, juna amo.

toje mi vin ĝuis,

sed el mia mano

longe vi forfluis.

Se vi, juna amo,

sur montar' ekzistus,

serĉi mi vin iras,

mi la vivon riskus.

Hvězdičky, hvězdičky...

Steloj sur firmament'.

punktoj vi el argent'.

ho kiel vi ĝojigis min

dum ĉiu nokta temp'!

Pri arto traduki

La ĉarma broŝuro „Saluton!“, kiun nia Asocio disvastigis, estis eldonita en diversaj pluaj lingvoj. Ke preparo de tiaj tradukoj ne estas facila laŭ lingva kaj laŭ aliaj vidpunktoj, atestas kritikoj pri eldono en lingvo bengala, kiun ni ĉi tie represas. Liveris ĝin nia amiko samideano C. Nyanasatta, budaista monaĥo de ĉefa deveno, vivanta de post multaj jaroj en Ceŝlono. En ĉi tiu okazo Esperanto denove pruviĝis eminenta perilo:

La bengallingvan broŝuron mi transdonis por studo al 3 kleraj bengalaj monaĥoj, mem aŭtoroj en tiu lingvo. Mi mem ne scias multon de ĝi — ĝi diferencas de la sirhala kaj palia kiel greka aŭ latina de moderna ĉeĥa!

La rezulto de la kritiko de plej lerta recenzisto, kun kiu mi „trapaŝis“ la tutan verkon helpe de la Esperanto-teksto, estas jena:

1) Manko de lingva unueco: Klasika literatura lingvo estas nekorekte miksitaj kun tre vulgara parollingvo. Tio en Oriento ne estas permesata! La interparola lingvo ne estas uzata en libroj, escepte de komika dialogo aŭ humora teatraĵo. La arĥaikaj vortoj kaj la vulgarismoj ofendas oreton de bengalo.

2) Frazologio ne-bengala: La aŭtoro pensis ĉeĥe kaj tradukis ĉeĥajn idiotismojn en lingvon bengalan. Tial kelkaj frazoj estas nekompreneblaj. Ekz. mencio pri „matička Praha stověžatá“ estas mallerte tradukita. Ĉeĥan idiomon oni devas parafrazi kaj ne traduki laŭvorte.

3) Uzo de klasikaj arĥaikaj vortoj por ordinara ideo kaj de vulgarismoj por poezia esprimo: Same kiel klasikaj frazoj, latinaj aŭ grekaj vortoj en la ĉeĥa, tiel klasikaj esprimoj en nova bengala lingvo estas permesataj nur en faka, science literatura verko, ne en propaganda broŝuro por infanoj.

LINGVO

26. text k překladu

Ano, chtěl bych, aby nebyli zapomenuti soudruzi, kteří věrně a statečně bojovali venku i zde a kteří padli. Ale chtěl bych také, aby nebyli zapomenuti ani živi, kteří nám pomáhali neméně věrně a neméně statečně v podmínkách nejtěžších. Aby z přešleři pankráckých chodeb na světlo života vyšly takové postavy jako Kolínský a jako tento český strážník. Ne pro jejich slávu. Ale pro příklad jiným. Neboť lidská povinnost neskončí tímto bojem a býti člověkem bude i dál zádati hrdinného srdce, dokud lidé nebudou zcela lidmi.
(Julius Fučík: Reportáž psaná na oprátce, 108)

Překlady prosíme do 25. dubna.

W. Solzbacher: Kion ni manĝu?

(Amuza studo pri vortoriginoj en Esperanto)

Kiel la nomoj de niaj vestoj, tiel ankaŭ la nomoj de niaj manĝaĵoj kaj trinkaĵoj montras, ke nia civilizo estas tutmonda. Ĉiuj kontinentoj alportis novajn vortojn al la lingvoj de Okcidenta Eŭropo kaj tiel al Esperanto.

La indianoj de Norda, Centra kaj Suda Ameriko pliriĉigis la civilizitan mondon per multaj gravaj vortoj, ekz. maizo, tomato, kakao, ĉokolado, tapioko, manioko, kasavo. Kiom da bongustaj fruktoj havas indianajn nomojn! La suka ananaso, la dolĉa papajo, la acide-dolĉa guavo, kies ĝelatenajo estas ŝatata frandaĵo, la aromriĉa persimono, la avokado, el kiu oni faras bonan salaton, estas fruktoj de la Nova Mondo kaj pruvas tion per siaj nomoj. Tabako kaj rumo, kvankam ili ne estas manĝaĵoj, eble ankaŭ meritas mencion ĉi tie.

Multaj fruktoj indikas originon per siaj nomoj. Persiko kompreneble venas el Persujo, ĉerizo el la regiono de Cerasus, en Azio, cidonio de Cydonia, en la Insulo Kreta, kaŝtano de Kastana, ĉe la Nigra Maro. Banano estas afrika, jujubo araba, mango malaĵa. Melono estas greka,abrikoto araba, pomo, piro kaj nukso latinaj vortoj. Pruno estas greka. Suko estas sanskrita (hinda), sukero kaj siropo estas arabaj vortoj.

4) Malĝusta ortografio: Kelkaj literoj ne estas korektaj, ne estis uzata ĝusta ortografio.

5) Mia kritiko estetika: En Oriento fiŝkaptado kaj ĉia ĉasado estas ofendaj al Hinduoj. Tial la bildo de fiŝo sur hoko estu anstataŭita en estontaj eldonoj per iu kun pli estetika impresio. Kaptado de fiŝoj, ĉasado, buĉado, produktado kaj vendado de alkoholaĵoj, estas konsiderataj malhonorindaj okupoj, taŭgaj sole por malsuperaj popol-klasoj. Laŭvere, iuj — ne ĉiuj — modernaj infanoj ĉi tie fiŝkaptas pro plezuro.

Sugestoj: Se ĉeĥoj serioze deziras doni seneraran libreton donace al bengalo (aŭ alia naciانو), oni ne pre donu la finan manuskripton por revido al denaska bengala (aŭ respektiva) naciانو kaj, se eble, presu ĝin de platoj preparitaj de tipoj kompostitaj en bengala presejo aŭ per fotostatika procedo laŭ originalo presita en Oriento. La angloj estas pli lertaj en tiu rilato! La bengala monaĥo povas reskribi la tutan tekston, ĉar nur kompleta reskribo — nenia korekto — faros la verkon perfekta. Li faros ĝin senpage en unueca, senerara kaj kutima idioma stilo. Preso per multobligo de manskriba teksto ne aspektas elegante, oni ne montru ŝparemon al eksterlando!

Fina opinio: Por ordinara propagando ĝi estas admirinda laboro, se la aŭtoro estas ĉeĥo kaj faris la tutan laboron sen helpo de indiĝena bengalo. Se indiĝeno helpis, li malhelpis kaj fuŝis la seriozan stilon de ĉeĥo per aldonado de vulgarismoj al la digna dirmaniero de scienculo-filologo.

La bengala monaĥo estis pro tiu laboro vizite ĉe mi dum unu semajno en Kalutuwa en Colombo. Mi aldonas folion kun liaj korektoj. Pli multaj korektoj estas en la libreto mem ĉe mi. Mi ĝin resendas, se nova eldono estos preparata. (O. G.)

Oranĝo estas araba, pampelmo malaĵa, kumkvato ĉina, mandarino sanskrita, limedo persa, bergamoto turka, kaj citrono greka vorto. Estas do, ke ĉiu el la citrusfruktoj havas alilingvan originon. La Esperanto-vortaroj estas sufiĉe konfuzaj pri la nomoj de tiuj fruktoj. Nur oranĝo kaj citrono estas oficialaj vortoj, bergamoto estas Zamenhofa, mandarino troviĝas en Plena Vortaro, pampelmo kaj limedo en Edinburgh-Vortaro, kumkvato nenie. Tial jen listo kun la botanikaj terminoj (latinaj) kaj la ĉeĥaj tradukoj:

pampelmo	Citrus decumana	grapefruit
oranĝo	Citrus sinensis	pomeranĉ
bergamoto	Citrus bergamia	bergamot
mandarino	Citrus nobilis	mandarinka
citrono	Citrus medica	citron
limedo	Citrus limetta	sładký citron
kumkvato	Citrus aurantium	kumquat

Rizo estas sanskrita, spinaco persa, saguo papua kaj malaĵa, cepo kaj fabo latinaj, pizo kaj petroselo grekaj vortoj. Pudingo estas kelta (gaela-irlanda). Pipro kaj zingibro estas sanskritaj, cinamo hebrea, mento kaj timiano grekaj.

El la baska lingvo venas anĉovo (anchuva, „seka“), el la islanda lingvo haringo. Sardino kaj sardeloj estis unue kaptitaj ĉe la Insulo Sardinio.

Ni finu per kelkaj rimarkoj pri trinkaĵoj. Kafo estas araba kaj turka vorto, teo venas el la ĉina lingvo, kolao estas afrikdevena, lakto greka, kremo latina. Kvankam la Profeto Mahometo malpermesis al siaj anoj la trinkadon de alkoholo, la araba lingvo donis al ni la vortojn alkoholo kaj arako. Julepo estas persa vorto, kaj ĝia unua signifo estis rozakvo. Rumo estas amerik-indiana vorto. La latina origino de likvoro estas evidenta. Vino estas greka, biero de germana origino. Brando ankaŭ estas germana („brulita“ vino), kaj ĝino estas mallongigo de juniperbrando. Grogo venas de la ŝercnomo de la brita admiralo Vernon, kiu vivis antaŭ 200 jaroj; viskio venas el la gaela lingvo (uisgebeatha, „vivakvo“).
El Amerika Esperantisto, dec. 1949

KRONIKO ENLANDA

Porpaca rezolucio de esperantistoj en Praha. La Esperantista Klubo en Praha aranĝis la 1. III. 1950 sian ĝeneralan kunvenon. La kunveno akceptis rezolucion kaj sendis ĝin al la Ĉeĥoslovaka komitato de pacodefendantoj. Jen estas ĝia resumo, kiel ĝi estis enpresita de Lidová demokracie 7. 3.: „Ni esperantistoj en Praha starigas nin en fronton de batalantoj por la paco en la mondo. Dum tiuj ĉi tagoj, kiam tuta progresema kaj pacama mondo iraŭguris grandan agadon por batalo konservi la mondpacon, ankaŭ ni esperantistoj turnas nin al ĉiuj esperantistaj societoj, ke ili influu siajn registarojn kaj parlamentojn kaj atentigu ilin pri iliaj devoj al la popolo, kiu malamas la militon kaj deziras por si pacon. Ni vokas ĉiujn niajn amikojn en la tuta mondo, ke ili decide kontraŭstaru iujn ajn militpreparojn kaj ke ili efike subtenu postulojn de la tutmonda pacmovado“.

La kunveno sendis ankaŭ salutleteron al la primatoro de la ĉefurbo Praha D-ro V. Vacek. La primatoro respondis per amika persona letero, en kiu li dankas pro kunlaboro de la Klubo kaj deziras sukceson al ĝia plua laboro. (jm)

Akahata, centra organo de Komunista Partio de Japanujo, erpresis la 9. I. 1950 sur sia unua paĝo fotokopion de protesta rezolucio verkita en Esperanto kaj en la ĉeĥa kaj subskribita de ĉiuj organizaĵoj kaj societoj en Plzeň kune kun Unueca Nacia Komitato (JNV), Komunista Partio de Ĉeĥoslovakio (KSC), Revolucia Sindikata Movado (ROH) kaj loka grupo de nia Asocio en Plzeň. (Vidu paĝon 4!) Rezolucio kun 80 folioj da subskriboj estis sendita al la japana registaro. Estas en ĝi esprimita akra protesto kontraŭ persekutado de progresema laboranta popolo en Japanujo kaj postulo liberigi ĉiujn politikajn arestitojn. Redakcia artikolo pri la rezolucio estas enkondukita per bildo de prezidento Gottwald. (jm)

Radio-filmo prezentita de la Verda Stacio la 1-an de Marto de la 23 — 24 horo kompilita de Ant. Slanina donis valorajn specimenojn el literaturo kaj kanto kaj muziko arte deklamitajn, kantitajn kaj luditajn laŭ postuloj de alta arto. Ni enskribu post konfirmo de leteroj el 18 landoj kaj 4 recenzoj gazetaj pri la disaŭdigo de la Vendita Fianĉino, kiun diris Ant. Slanina, la tutan programon: Psalmo 23 el La Biblio legita de V. Piskáček, biblia kanto de Dvořák kantita de K. Lajš, Versoj el Infero deklamitaj de VI. Leraus, floraĵo el En la Puto, kantita de ĥoro de la Ĉeĥoslovaka Radio, fina sceno el Sonĝo de Somermeza Nokto ludita de Bobek,

NI LEGIS

Prelegvojaĝo de Dr Ivo Lapenna tra Francujo finiĝis en februaro. Li havis 64 prelegojn, aperis pri ili pli ol 100 gazetartikoloj. En „Esperanto“ el marto li analizas siajn spertojn provante konstati kelkajn trajtojn de nia movado, komunajn tra la tuta mondo, en artikolo trafite titolita „Nia forto kaj nia malforto“. Forto estas la relative tre bona scio de la lingvo ĉe multaj esperantistoj. Ĝi estas granda kaj ĝojiga diferenco kompare kun jardekoj pasintaj. „Hodiaŭ troviĝas ne nur en Parizo sed eĉ en malgrandaj vilaĝoj multaj homoj, kiuj kapablas ne nur interkompreniĝi sed eĉ sen preparo traduki malfacilajn prelegojn kaj paroladon. Hodiaŭ ekzemple en Francujo estas korszidernda nombro da infanoj, kiuj senĝene kaj flue parolas la Internacian Lingvon. Kaj pri tio ni ne skribas fruntartikolojn. — Lingvo en kiu petolas hubeto, en kiu kungenie reaperas la perso de Shakespeare aŭ de Dante, per kiu luktas laboristo aŭ defendas sian sciencan teorion intelektulo, lingvo de ĉiutagaĵaj bagateloj kaj de profundaj emocioj — tia lingvo sufiĉe pruvus sian vivkapablon. — Ne estas do vero, ke la strukturo de la lingvo mem aŭ iaj ĝiaj akcesoraĵoj, ekzemple la supersignoj, kaŭzis ĝian nesufiĉan disvastiĝon, kiel tion opinias kelkaj niaj amikoj, cetero iom nervozaj kaj ambiciemaj.“ Tiuj faktoj do estas nia forto.

Nia malforto estas nekontentiga stato de organiziteco. „Niaj bazaj organizaĵoj, nome la societoj, preskaŭ

Procházková, Leraus, Holmanová, komencaj versoj el Nekrasov-traduko de Onjegin deklamitaj de K. Höger, Erben-poemo „Saliko“ en Pumpr-traduko deklamita de ĥoro el Holmanová, Procházková, Švabíková, Höger, ĉarma popolokanto „Amo, juna amo,“ kantita de fratinoj Zvědělíková, ĉapitro el Avineto tradukita de Slanina, legita de Švabíková, Marinjo-ario el la Vendita Fianĉino kantita de Věra Strelcová. La programon reĝisoris Dalibor Chalupa. Ni gratulu al li kaj al Slanina pro tre taŭga elekto kaj prezento de tiu ĉi diverstema programo. Ĝi tre plaĉis al ni kaj ni kredas ke ankaŭ al multaj aŭskultintoj.

Neniu forgesu aŭskulti la 5-an kaj la 12-an de aprilo, kiam estos dissendata la opero Najado (Rusalka) de Dvořák en traduko de Tomáš Pumpr. Ĉar estos dissendata la kompleta opero, oni dissendos ĝin en du tagoj, ĉiam merkredon de la 23 — 24 horo per stacioj Praha I kaj Brno I. Nepre aŭskultu kaj konfirmu la aŭskultadon.

Korekto de preseraro. Pro miskompreno dum aŭskultado estas en nia lasta numero sur p. 4, enskribita false nomo de eminenta basisto, kiu kantis en Vendita Fianĉino Kecalon. Devas esti: Rudolf Asmus. Pardonu la leganto kaj la kantinto.

Slovak-lingva faldprospekto pri Trenčín enhavas enkondukan parton krom en la slovakaj ankaŭ en Esperanto. La prospekton tre riĉe ilustritan eldonis Slovakotour en Trenčín kaj ĝi estas tie ricevebla. La bildoj parolos al ĉiu.

Konferenco de perantoj kaj funkciuloj el la kvara regiono okazis la 19. II. en Cheb. La ĉefa punkto de agado estis someraj E-kursoj. Dum mezo de julio okazis du-semajna kurso por infanoj en Loket kaj la 7. — 19. de aŭgusto kurso por progresintoj en Karlovy Vary. Detaloj sekvos. Regiona Kleriga Konsilantaro en Karlovy Vary subvencii Regionan Komitaton per 7000 Kčs kaj Distrikta Kleriga Konsilantaro en Cheb per 700 Kčs.

„Lerneja reformo en Ĉeĥoslovakio“ aperis en februaro en dua eldono. La 5000 ekzempleroj de la unua eldono estis elĉerpitaj dum kvin monatoj. Konfirmoj pri ricevo de tiu ĉi tre instrua kaj enhavoriĉa libreto venis kun multaj trafaj rimarkoj kaj laŭdaj mencioj el 40 landoj. Ĉiuj, kiuj la verkon dissendis, tiuj, kiuj konfirmis la legon, kaj tiuj, kiuj uzis ĝin por raportoj en siaj gazetoj, akceptu sincerajn dankojn.

ne ekzistas. En tuta Francujo mi ekzemple vidis nur unu veran societon kun propra ejo, kun propraj biblioteko, legejo, kursejo k. t. p. (Romans). La grupoj, kiuj estas terure malriĉaj (kelkfoje la jara kotizo egalas al eksterlanda afranko de letero) kunvenas plejparte nur unufoje en la monato... Estante plejparte nedinamismaj niaj grupoj ne altiras novajn fortojn. Sekve ili ĉiam pli kaj pli fariĝas fermitaj, preskaŭ familiaj rondoj.“

„Koncerne la propagandon la afero prezentigas ankoraŭ pli malhele. Pri la multnombraj demandoj koncernantaj la propagandan agadon oni preskaŭ neniam diskutas. Ĉiu laboras laŭ sia plaĉo kaj bontrovo, ofte tute fuŝe. Por fariĝi ŝuisto aŭ kudristino aŭ por praktiki iun ajn metion oni devas lerni ĝin kaj ekzameniĝi. La diskonigo kaj la instruado de Esperanto estas pli ol metio. Tamen por publike aktivi por la Internacia Lingvo sufiĉas surmeti la verdan stelon! Ni kompreneble havas multajn lertajn agantojn por nia afero, sed unue ilia laboro ne estas plene harmoniigita, kaj due ankoraŭ abundas fuŝuloj, kies malutilan agadon neniu malhelpas.“ — „Jen tie kuŝas nia malforto: troa individuismo; manko de memdisciplino kaj organiziteco; manko de veraj funkciantaj societoj; manko de fortoj kaj aktivaj propagandaj centroj; manko de profunde ellaborita laborplano.“ ...

„Ni klopodu realigi almenaŭ la unuan paŝon dum la Pariza kongreso!“

Al la trafaj vortoj de la nova aktivulo mi volus sole aldoni, ke dum nia juneco ni egale severe juĝadis diversajn „fuŝulojn“. Ce fino de miaj tagoj mi trovas, ke ankaŭ la „fuŝuloj“ helpis al la movado grave. Mi parolus nun pri ili multe pli milde ol iam. La plej grava manko de la movado estas la malgrandaj nombroj, kun kiuj ni estas devigataj labori. Kaj la stranga opinio de kelkaj organizantoj de nia movado, ke oni povas organizi nin sen mono por kotizoj ridinde malaltaj, el kio rezultas tiu malriĉeco de lokaj grupoj. Ni estas tre kontentaj, ke analizo de nova aktivulo konsentas kun niaj spertoj.

Statistikan resumeton pri ŝtato Rio Grande do Sul eldonis Ŝtata Statistika Departamento en 5000 ekz. okaze de la 12-a Brazila Kongreso de Esperanto okazinta en la ĉefurbo Porto Alegre (329.100 enloĝantoj). La tabeloj estas tre sinoptikaj. La statistika servo ŝajnas esti en Brazilo sur tre alta nivelo.

Steloj kun Esperanto-nomoj. Astronomo d-ro Yrjö Väisälä en Turku (Finnlando), eltrovinto de multaj kometoj kaj malgrandaj planedoj, nomis du planedojn el asteroidoj (cirkulantaj inter Marso kaj Jupitero) „Esperanto“ (planedon n-ro 1421) kaj „Zamenhof“ (planedon n-ro 1462). Oni konas hodiaŭ preskaŭ mil-sescenton da tiuj asteroidoj, estas unu inter ili kun diametro mezuranta diametre kvincent metrojn. Do nomo de nia Majstro kaj de nia lingvo atingis jam la ĉielon. (Laŭ Heroldo el 1-a marto).

Ekspozicio filatelo-esperantista „Rodrigues de Abreu“ en la urbo Bauru, ŝtato de São Paulo, Brazilo, de la 15a ĝis la 24a de novembro 1949, omaĝe al memoro de Rodrigues de Abreu, neforgesebla baurua poeto. La ekspozicio sub patronado kaj direktado de Grupo esperantista de Bauru kaj Filatela Departamento de Brazila Junular-organizo, atingis grandan sukceson pro la vera intereso, kiu vekigis en ĉiuj sociaj klasoj ne nur en tiu urbo. Dum semajno, personoj el ĉiuj aĝoj kaj rangoj, ĉirkaŭ 5 miloj, vizitis la bone organizitajn standojn arte lokitajn en la vasta salono de majesta konstruaĵo EMES, ĝentile disponigita al la Organiza Komitato de l' firmo Martins, Machado & Martha. La inaŭguro je la 15a horo, ĝuste en la datreveno de l'proklamo de l'brazila respubliko, estis aparte rimarkinda okazintaĵo, ĉar ĉeestis ĝin eminentaj personoj kaj aŭtoritatoj, inter ili sro Otavio Pinheiro Brizola, ur-

bestro, kiu prezidis la solenaĵon kaj tranĉis la simblan rubandon, kiu fermis la enirejon de l'ekspozicio.

Scienca Revuo (W. P. Roelofs, Kerpap ZZ 53, Soest, Nederlando) aperigis en januaro 1-an numeron de la dua jarkolekto. La fruntartikolo „La scienca tasko de Esperanto el konteoria vidpunkto“ de G. Hamming (Nederlando) rekomendas enkonduki por ĉiu scienco kaj por ĉiu aŭtoro specialan „aspon“, ĉar „ĉiu konulo faras sian propran malansiĝan mondon“. Tial la aŭtoro „difinas“: „Lingvo speciale farita por formuli difinitan malansiĝan mondon, nomiĝas aspon, kondiĉe ke ĝi similu kiel eble plej multe al Esperanto. — La aldonita kondiĉo estas ebla, ĉar la diferencaj malansiĝaj mondoj kutime enhavas erojn similan. La utilo de tiu kondiĉo estas, ke oni tiel povas lerni multajn asponjn“.

„Ansiĝo“ estas tio, kio restas, kiam la konanta individuo mortas. Por eviti miskomprenon la aŭtoro volas emfazi, „ke la vorto ansiĝo indikas konteorian nocion, kaj ne ekzistecan nocion. Ekzistece, konanta individuo estas samspeca (ne identa) kun konata individuo, konteorie povas ekzisti granda diferenco. Konteorie ĉiu konata individuo estas ansiĝaĵo, la konanta individuo estas la aganta mi. Ni lin indiku kiel konulon“.

Mi difinis konulon kiel: subjekto fariĝinta objekto de noetika esploro pro sia kapableco koni. La vorto konulo ŝajnas al mi taŭge kreita. Sed ĝenerale la aŭtoro pekas kontraŭ principo de neceso. Legante tian traktadon oni komencas ŝati utilecon de tiu principo. Konteorio estas noetiko (laŭ germana terminaro teorio de kono).

Bolivia Revuo (redaktanto E. Alcócer Hurtado, Casilla 381 Oruro - Bolivia) estas nova propaganda gazeto en Suda Ameriko, aperinta en 1949. Kajeroj po 20 paĝoj, hispan- kaj esperantlingve. Nova pruvo pri vivo de nia movado en la hispanlingva Ameriko. En dua numero el aŭgusto ni legas en artikolo „Bolivio - Neregebla popolo“ de Waskar Nina-Nina sekvaĵajn vortojn: „124 jaroj da respublika vivo kaj pli ol 131 revolucioj. La leĝanto povas vidi, ke ne estas reĝimo, kiu povis regi la respublikon trankvile; tamen ni havis diktatorojn. Jes, tiranojn ankaŭ... Sed por ni neniu el tiuj ĉi parti-agoj povas signifi revolucion... Revolucio estas por ni la historia agado, kiu ŝanĝos la tutan ekonomian strukturon de la lando. Ĝis nun neniu el tiom da kazern-agaĵoj atingis fari tion, sed disdoni inter la partianoj la tutan ŝtatkason.“

LOKAJ INFORMOJ

Brno. — Popola Akademio aranĝas 5 kursojn en kiuj instruas J. Vondroušek en urba centro 26 p., J. Kořínek en Husovice 20 p., J. Friedrich en Královo Pole en du klasoj 46 p., J. Friedrich en Židenice 39 p. La kursoj komenciĝis en februaro. Invitis al ili 950 afiŝoj. — Klubaj kunvenoj estas relative bone vizitataj, meznombro 50 personoj. Programoj estas ĉiam bonaj. Speciale interesa estis kunveno la 17. I. „Dek du mensoguloj“, kiu montris, ke la klubo havas tre kapablajn gesamideanojn kaj eminentan reĝisorinon V. Borská. Ankoraŭ pli grava estis „Teatra vespero“, kiu ravis ĉiujn multnombrajn ĉeestantojn (ĉ. 90) kaj estis pruvo ne nur pri granda talento de la rolintoj, sed ankaŭ pri granda arto kaj entuziasmo de s-ino V. Borská. La 21. 2. okazis brile sukcesinta karnavalo, bonega orkestro, duonhora programo kanta de tre populara opereta kantistino Vanda Žitová kaj du famaj komikuloj, bonega humoro, ega ĝenerala kontenteco. Ni citas la rolintojn el la „Dekdu mensoguloj“: M. Adamcová, M. Otisková, A. Svozilová, St. Fröhlich, F. Frýbert, L. Kovář, B. Mudrych, St. Loučanský, R. Nečas, F. Vyskočil. La Teatra vespero kaj Dekdu mensoguloj estis ripetitaj la 18. 2. okaze de ekzamenoj en Brno.

Brno-Židenice en sia jarkunveno la 26. I. elektis prez. Vilém Zelníček, sekret. kaj grup-adreso: Marie Ambrožová, Špačková 3.

Břeclav. — Gazeto de Industria kaj sociale higiena lernejo Družba havas Esperanto-rubrikon gvidatan de Milan Vítovský. La lerneja leĝejo posedas ankaŭ E-revuojn. — Kunvenoj de la Rondeto ĉiumarde en la Industria lernejo je la 19—21 h.

Ĉeské Budějovice. — „La Progreso“ elektis en sia jarkunveno la 6. II. prez. Vladimír Wurm, sekretario Václav Kopenc.

Děčín-Podmokly. — La 31-an de januaro IV-a jarkunveno de la Esperanto-grupo „Ĉiam antaŭen“. Nova komitato: prez. Jaromír Babička, vicprez. Vlastimil Pössnicker, sekret. Václav Růžička, Kezinova 10, Podmokly (al li direktu korespondaĵon), kas. Miroslav Jelínek. Post elekto kaj diskuto pri estontaj laboroj estis prezentita al 30 ĉeestantoj bela filmo pri Nova Zelando, prunteprenita de la Asocio. La prezentado estis akompanata esperantlingve kaj ĉefe per nove verkita teksto, por kiu estis uzita parte la teksto liverita, parte leteroj de novzelandaj samideanoj, parte eltiraĵoj el vojaĝlibroj de fama ĉeĥa vojaĝanto Josef Kořenský. Post bona sperto rekomendas la grupo Podmokly al ĉiuj grupoj en la respubliko, ke ili konatigu siajn membrojn kun tiu altvalora edukfilmo, kies prezentado alportos ĝojon kaj al la aranĝantoj kaj al la rigardantoj. Celante plivigliĝi la kluban vivon la grupo aĉetis bonan projekcian aparaton, sed ĝi ne posedas ankoraŭ sufiĉe multe da filmostrioj. Ni direktas al ĉiuj kluboj, kiuj posedas taŭgajn filmostriojn, plej sinceran peton, ke ili afable pruntedonu al la grupo striojn (32 mm) kun teksto. Ĝi resendos ĉion tuj sendifekte kaj repagos la afrankon. Siajn filmojn ĝi proponas interŝanĝe. Ĉion adresu al la sekretario!

Gottwaldov. — Ce la Uzina klubo de sindikata movado en la nacia entrepreno Svít kreigis Esperanto-rendeton kun 115 junaj interesuloj, kiuj kunvenas ĉiun vendredon en Societa domo (III-a et.), ĉambro 305 je la 19-a horo.

La estraro de la Uzina klubo decidis pagi al 30 membroj la kurspagon de la Esperanto-kurso, se ili ĝin regule kaj ĝis la fino vizitos.

Hradec Králové. — Jarkunveno de E. K. la 22. II. elektis prezidanto J. Dolanský, I-a sekretario František Pytloun, II-a sekretario V. Dušek, kasisto Vr. Štědrón. — Distrikta peranto Jaroslav Dolanský, Masarykovo náměstí, tiskárna. En kurso por progresantoj kun 30 partoprenantoj instruas Dolanský, Pytloun, Dušek.

Cheb. — En jarkunveno la 20. I. estis elektita nova prez. Michal Szmigiel kaj nova sekr. kaj grup-adreso Frant. Vrchota (tr. krále Jiřího 17). Al prezidinto Bystřický, kiu pro graveco de sia nova publika funkcio ne povas dediĉi sin al kluba laboro, estis unuanime esprimita danko pro lia picnira laboro. — Kiam K. Höger ludis kiel gasto la 1. II. en la urba teatro, salutis lin kluba delegitaro malantaŭ la kulisoj kaj estis tre ĝojigita per lia respondo en perfekta Esperanto. — Klubaj kunvenoj okazas nun ĉiujauĉe.

Karviná. — Kurso en domo de pola mezlernejo komenciĝis la 10-an de januaro.

Kladno. — En februaro okazas en Popola Akademio du kursoj ĉiu po 12 partoprenantoj, instruas s-oj Ochotný kaj Vlčková.

Kolín. — En jarkunveno la 25. I. estis elektita prez. Jan Janda, sekr. Robert Halška (III, Vinařického 273).

Kopřivnice. — Loka kleriga konsilantaro aranĝas (de novembro) kurson por 37 ĝejnuloj.

Liptovský Hrádek. — Esperanto-ekspozicio daŭris de la 16-a ĝis 21-a de novembro 1949.

Mariánské Lázně. — Kurson gvidas s-o O. Pavelka. Estis fondita loka grupo, kies prez. estas O. Marian, sekretario O. Pavelka, kasisto V. Kaplánek. Kunvenoj ĉiun duan mardon en hotelo Ema.

Moravská Třebová. — En kadro de kultura laboro de la loka grupo de Asocio de Junularo okazas kurso por 17 p. iniciatita de s-o Silný kaj helpata de s-o Hanzlík. Instruas s-o Silný.

Nejdek. — Grava sukceso estis E-vespereto en plena halo de fabrika klubo, kiu aŭskultis paroladon de s-o MUDr. tr. Vaněk, koncerton de lia „Verda Kvarteto“ kaj du samideanojn el Cheb, kiuj ridigis la tutan publikon. — Kurso gvidata de Dr-o Vaněk daŭras.

Nový Bor. — En jarkunveno la 29. I. elektita prez. Dro Josef May, sekretario St. Majer (II, Koněvova 292, tel. 143).

Ostrava. — Fervojista Esperanto-Klubo okazigis jarkunvenon la 15. XII. 1949. Prez. Josef Buček, sekretario Jaroslav Franek. Adreso: Ostrava, hl. nádraží. Membro-nombro 18.

Pardubice. — E. K. „Dr Schulhof“ aranĝis sian jarkunvenon la 19. II. Nova prez. s-ino Růžena Veverková, sekr. kaj poŝt-adreso Karel Franc, II, Okrouhlik 811.

Rokycany. — En jarkunveno la 20. I. 1950 estis elektita prez. Karel Bašlik, sekretario Jar. Mráz (312/III). Ejo: Restoracio Sokolovna, vendrede je la 19,30 h. — 22 membroj.

Týniště n. Orli. — En la jarkunveno la 18. XI. 1949 elektita prezidanto Josef Doležal, sekretario Valdemar Vinař (ĉp. 314).

Vejpřty. — S-o instruisto Vacek gvidas kurson.

ESPERANTISTA VIVO

Josefina Marečková, kiu en komencaj jaroj de la Respubliko eldonadis gazeton Bratislavská Pošta, en kiu ŝi propagandis nian lingvon kaj restis al nia afero fidela dum sia tuta vivo, ĝisvivis la 1-an de marto 1950 sian 70-an jaron. Nune ŝi vivas en Holič (Slovakujo). Ŝi akceptu niajn amikajn salutojn!

Edziĝo. Jaroslav Prášil en Břeclav kaj Anna Stachovičová, la 18-an de februaro. Elkoran gratulon!

Mortis Genevía Bočková, edzino de samideano Nikolaj Boček en Hradec Králové, en januaro. La edzo akceptu nian kondolencon.

Somera kolegio de Esperanto en Doksy 15.—29. VII. 1950

II. zpráva:

Místní osvětová rada v Doksech otevře za odborného vedení tamního esperantského klubu a stálého přípravného komitétu dne 15. července t. r. řadu čtrnáctidenních odborných kursů a esperantský seminář, doplněný cyklem přednášek z esperantologie a esperantismu. Dopoledne budou zcela věnována kursům, odpoledne koupání v Máchově jezeře a výletům, večery pak budou vyplněny společenskými podniky, jež doplní cíl kursů.

Ubytování bude pouze v soukromí. Pomýšlí se jako loni i na společné ubytování těch, kdož o ně projeví zájem, a na stravování (mimo restaurace) i v záv. kuchyni. Počet žactva je omezen. Výše školného za 48 vyučovací hodiny, ubytovného a vstupného do společenských podniků bude sdělena v příští zprávě. V neděli 30. VII. dopoledne konají se pro žáky přítomné v Doksech před zkušební komisí Svazu dobrovolné zkoušky o znalosti esperanta, k nimž třeba se přihlásit přímo u Svazu.

Propagační prospekt LKED vyjde 1. V. Vyžádejte si jej! — Absolventům kursů v Doksech, jakož i těm, kdož dávají přednost horám a horské turistice před koupáním v rozsáhlém jezeře, pobytem na jeho písečných plážích a toulkami v hlubokých lesích, doporučuje se účast na letních kursech esperanta, pořádaných od 5.—19. srpna t. r. ve Svitu ve Vysokých Tatrách. (Informace: p. K. Šolc, Mladá Boleslav I, 41.)

Další zpráva v příštích číslech „Esperantisty“ a v oběžníku „Verda Voĉo de Doksy“.

L. K. E. D.

Letní kurs esperanta v K. Varech

perle ĉeskoslovenských lázní, *opět letos bude*

Počítejte s tím v plánování své dovolené! Podrobnosti v příštím čísle.

SCIIGOJ

En la Pariza kongreso anstataŭ ĝis nun kutimaj labor-kunsidoj funkcios komisionoj, kiuj post prelego de ĉefa raportanto komisiita de UEA-komitato diskutos la temon kaj akceptos rezoluciojn aprobitajn de la ferma kongresa kunsido. Ĝis nun estas antaŭvidataj kvar komisionoj kun diversa nombro de subkomisionoj: 1. E. en la lernejoj. 2. Internacia trafiko. 3. Sciencoj puraj kaj aplikataj. 4. Intelektaj intersanĝoj.

Pariza Radio depost 1-a de marto ne plu dissendas en Esperanto. Laŭ informo de UEA estas iom da espero, ke la dissendoj estos denove provitaj, se venos amase petskriboj. Ni tre rekomendas al niaj legantoj, ke ili plenumu tiun peton kaj ke ili skribu al Radio-diffusion Français, 118 Champs Elysées, Paris 8.

Josef Vitek, nun en Parizo, informas, ke li ne peras abonojn al Heroldo de Esperanto.

Oomoto post longa etapo de martireco disrompis al si la malnovan ŝelon, evoluis kaj kreskas sub la nova nomo de Aizen-en (Gardeno de Dieca Amo). Universala Homana Asocio restarigis la torĉon por mondopaco. Ĉiuj malnovaj amikoj de Oomoto kaj U. H. A., abonintoj kaj kunlaborintoj de „Oomoto Internacia“ estas petataj tuj skribi al: Centra oficejo de Aizen-en, Kameoka, Kioto-fu, Japanujo.



Esperantista poŝkalendario 1950

vekis grandan intereson ĉe samideanoj en la tuta mondo. Ĉar la eldonkvanto estas limigita, rapidu per via mendo. Ĝi estas ankraŭ havebla por Kčs 35.— plus Kčs 1,50 afranko ĉe Esperanto Asocio ĈSR, Malá Štěpánská 7, Praha II, aŭ ĉe Esperantista Klubo, Zamenhofova 1010, Hradec Králové II.

Unuaj libroj pri Esperanto

La unua libro de Zamenhof aperis la 14-an de julio 1887 kun titolo

D-ro Esperanto:

МЕЖДУНАРОДНЫЙ ЯЗЫК ПРЕДИСЛОВИЕ И ПОЛНЫЙ УЧЕБНИК

En la sama jaro aperis ankaŭ pola, franca kaj germana eldonoj verkitaj de Zamenhof kaj en j. 1888 aperis angla eldono farita de R. Geoghean kun titolo Dr Esperanto's International Language. Introduction and Complete Grammar. La broŝuroj kostis 15 kopejkojn la du unuaj kaj 20 kopejkojn la tri ceteraj. La rusa broŝuro konsistas el kovrilo, 40 paĝoj kaj folio kun esperantaj radikoj kun rusaj tradukoj. Arango de la kvar ceteraj broŝuroj estas tute analoga. Sur la titolpaĝo estas krom la titolo skribita „por rusoj“ kaj ruslingve: „Por ke lingvo estu tutmonda ne sufiĉas nomi ĝin tia“. La broŝuro estis presita ĉe fl. Kelter en Varsovio. Sur la dua paĝo estas dirite en la rusa lingvo: „La lingvo internacia, kiel ĉiu nacia, estas komuna propraĵo; la aŭtoro forlasas por ĉiam ĉiujn personajn rajtojn al ĝi.“ Pli poste nomis Zamenhof tiun broŝuron „La Unua Libro“.

Richard Geoghean (gjaĝagan), irlandano, naskiĝis 1866, studis filologion en Oxford 1883—1887, estis tie premiita en la ĉina lingvo, servis en fremdlanda fako de japana registaro, de 1902 ŝtata stenografiisto en Alasko, kie li mortis en Fairbanks 1943. Aktiva en la movado ĝis sia morto.

En la antaŭparolo de tiu „unua libro“ estas unuaj esperantlingvaj tekstoj: Patro Nia, El biblio, Modelo de letero, Mia penso, Ho mia kor' (la du originalaj poemoj de Zamenhof), traduko el Heine. La ruslingva Unua libro enhavas sume 947 radikojn, el kiuj sur la vortara folio estas 917 radikoj; la ceteraj enestas en la teksto.

En la jaro 1889 aperis fare de Zamenhof kvin „Malgrandaj vortaroj de la lingvo Esperanto“ (kun antaŭparolo) por Rusoj, Poloj, Francoj, Germanoj, Angloj. La antaŭparolo estas 8-paĝa. Ĝi estas presita tiel, ke la vortelementoj estas dividitaj per punktoj por ebligi tujan komprenon al posedanto de la vortaro:

„La lingv-o Esperanto est-as tiel konstru-it-a, ke se Vi el-lern-is ĝi-n, Vi pov-as korespond-i kun la tut-a mond-o, kaj ĉiu en la mond-o Vi-n facil-e kompren-os, se li eĉ tut-e ne kon-as tiu-n ĉi lingv-o-n.“

En tiu jaro aperis ankaŭ la unuaj du esperantlingvaj tradukoj, ambaŭ de polo A. Grabowski: La Neĝa Blovado, rakonto de Puŝkin kaj La gefratoj, komedio de Göthe. Zamenhof numeradis la elirantajn verkojn. Ĝis oktobro 1889 eliris sume 29, preskaŭ ĉiuj maldikaj broŝuroj sur malmultekosta papero.

Estas inter ili jam ankaŭ „Dua libro de l'lingvo Internacia“, „Aldono al la Dua libro“ de Dr-o Esperanto, aperintaj en 1888, Plena vortaro rusa-internacia (por 1 rublo) kaj Meza vortaro internacia-germana, ambaŭ de Dr-o Esperanto.

Tiun literaturon eldonis Zamenhof je propra risko. La kapitalon por tio bezonan disponiĝis al nerica kuracisto, kies praktiko ne estis tro profitdona, lia bopatro Aleksandro Silbernik, posedanto de malgranda sapo-fabriko en Kaŭnas, en kiu li persone laboris ĝis sia 74-a jaro. Eĉ li ne estis homo riĉa kaj havis 9 gefilojn, sed li sciis kompreni gravecon de ideo de sia bofilo kaj subtenadis lin kaj lian familion larĝvide. Zamenhof mem aperigis jam en tiuj unuaj jaroj krom sia idealismo ankaŭ mirin-

dajn talenton organizan kaj ordemon, kiuj estas vidataj en lia zorgo pri reklamado kaj disvendado de tiuj unuaj libroj esperantaj. Kaj ankaŭ grandan laboremon: ĉar estante tre konsciencia kuracisto de malriĉaj pacientoj en Varsovio li trovis daŭre tempon kaj por la ampleksa korespondado kaj por la verkado kaj kreado pri la lingvo internacia. Kaj rimarkindan praktikecon, kunigitan kun mirinda sento por justeco, trajtoj dokumentitaj per liaj leteroj, precipe tiuj al francaj eminentuloj, aperintaj en du volumoj en 1948 kaj 1949.

En la Dua libro estas dirite: „La Lingvo Internacia devas vivi, kreski kaj progresi laŭ la samaj leĝoj, laŭ kiaj estis ellaborataj ĉiuj vivaj lingvoj, kaj tiu formo, kiun mi donis al ĝi, tiu gramatiko kaj vortaro, kiun mi prezentis, devas esti sole fundamento, sur kiu estos ellaborata la efektiva lingvo internacia de l'estonteco.“

Do ne ellaborata per decidoj de la aŭtoro aŭ de iu aŭtoritaton uzurpanta komitato, sed per la ĉiutaga vivo, uzado de la lingvo. Sajnas al ni, ke en tiu modesteco kaj fido al kreado kolektiva estas la plej genia elemento en la Zamenhova ideo.

Překlad prvního úkolu:

1. Diru al li, ke li venu nur vespere. 2. Diru tion al li tuj, por ke li tion sciu ĝustatempe. 3. La urbeto havas mil leĝantojn. 4. Li heredis milionon da dolaroj. 5. Li konvinkis min, ke li pravas. 6. Lumradio, luma radio. 7. Kelkaj lumantaj lampoj. 8. Mensoga informo, mensogema infano. 9. Glaso da vino; vinglaso, vina glaso. 10. Li iris tra arbaro.

Poznámky: V prvním souvětí je s „aby“ uvedená vedlejší věta snahová čili zádací (subpropozicio vola), proto je v ní samotné „ke“, v druhém souvětí je s „aby“ uvedena příslovečná věta účelová (subpropozicio cel-adjekta), proto je tam „por ke“. 3. Esperantské číslovky všechny se pojí s prvním pádem, není u nich druhý pád jako v češtině u číslovek od pěti. Proto: „mil kronoj“; genitiv partitivní je jen tehdy, je-li z číslovky podstatné jméno: milo da kronoj. 4. Miliono je vždy podstatné jméno.

Druhý úkol:

Přeložte tyto věty, jež jsou vesměs cvičením v užívání akusativu (4. pádu):

1. Viděl krasavici (přímý předmět, rekta objekto). 2. Pták letěl v zahradě. 3. Pták letěl do zahrady. (Akusativ tu má vliv i na slovesný vid.) 4. Vešel do pokoje. 5. Kdy se to stalo? Prvého února. Ve čtvrtek. 6. Jak dlouho zůstanete v Moskvě? Tři týdny. 7. Zahrada je 20 metrů dlouhá, 15 metrů široká.

Vekiĝo

Soniĝis sinjoro profesoro, ke li ekdormis en sia klaso. Subite li vekigis. Ĝi estis vero efektiva.

Strange

— Ĉu vi, fraŭlino, ŝatas skiadon?
— Ho, treeĝe, precipe dum vintro.

Plimulto - malplimulto. Kiam en plimulto, ni estas ekzamenataj pri toleremo; kiam en malplimulto, pri kuraĝo. (Ralf W. Stockman en „Magazine Digest“.)

Korekto de preseraro: Sur la unua paĝo de „Elleerri“ bonvolu en la lasta slogano legi „Mardoj“ anstataŭ „Marto“.